katolika sento

9 JARO 54a U.E.C.I.



KATOLIKA SENTO
BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. **2500**

Abonkotizo italliroj **2500**

KATOLIKA SENTO

nº 9

54a Jaro Septembro 1975

POST LA 36ª IKUE-KONGRESO

Por ĉiuj, kiuj partoprenis en la 36ª IKUE-kongreso, ĉi tiu restos inter la plej fruktoriĉaj momentoj de ilia religia vivo. Fakte, se la Kongreso havis ankaŭ la kutiman celon de programado de siaj entreprenoj, ĉi tio en la kadro de la Jubilea Jaro atingis nur duarangan rolon, por lasi al la religia la unuan. Bone intuiciis tion la aliĝintoj al nia invito, ĉar inter ili troviĝis ne malmultaj, kiuj ĝis nun ne apartenis al nia Unuiĝo, sed profitis pri la helpo de ĝi oferita, por pilgrimi pentosente al Romo, laŭ la programo de la Kongreso: "Renoviĝo kaj repaciĝo".

Prepare al la Kongreso dum la antaŭaj monatoj nia revuo donis instruojn kaj klarigojn, tiel ke la partopreninontoj pli bone disponu sian animon al la granda evento. Aparta 62-paĝa kajero resumis kaj aldonis ĉion necesan por gvidi ilin al la celo. (Tiuj, kiuj kolektas la numerojn de K.S., povos kunigi ĉi tiun kongreslibron kun la bultenoj, ĉar ambaŭ kompletigas la kolekton). Kongreslibro, la libro de la pilgrimonto, insignoj de la Kongreso kaj de Jubileo, medalo de la Papo, kongresaj dokumentoj kaj multaj belegaj italaj turismaj prospektoj laŭ pluraj lingvoj, estis disdonitaj al ĉiu en specia la kongresa saketo.

Por helpi tiujn, kiuj estis devigataj forlasi sian hejmon kelkajn tagojn antaŭ la kongreso, ni zorgis, por ke ili havu eblecon trankvile loĝi ekde sia alveno al Romo en la Kongresejo, kvankam ĉi tio fuŝis la antaŭfaritan laboron por asigni al ĉiu difinitan ĉambron kun difinita kunulo kaj blokis la ordigitan evoluon de nia administrado.

Je la sabata vespero okazis la unua grava programo de nia kongreso. Ĉar pro teknikaj kaŭzoj ne estis permesita la uzado de la granda aŭlo, ĝuste kelkajn tagojn antaŭ nia kongreso, ni estis devigataj serĉi en la najbaraĵo taŭgan lokon. Oni trovis tion en la apuda instituto "Villa Emaus" situanta en la sama vojo. Kaj tiam oni povis ricevi eĉ pli proporciajn, kvankam malmultekostan salonon kaj pli taŭgan kapelon.
Fakte, kiel ni spertis dum ĉiuj aliaj tagoj, estis vera problemo pretigi decan kuncelebradon de tiel multenombraj sacerdotoj, tridek aŭ kvardek pastroj samtempe. Ĉi tiu estis verŝajne la unua okazo en kiu ni devis admiri la intervenon de la dia Providenco. Alian sperton ni ricevis, kiam ekde la unua renkontiĝo, la prezidanto de la LKK konsterne konstatis la misteran malaperon de sia aktujo, en kiu estis ordigitaj ĉiuj dokumentoj necesaj por la administrado, la programado kaj disvolviĝo de la kongreso, resumo de longa prepara laboro: se ĉi tio estis, kiel evidentiĝis, ŝtelado, ĝi kaŭzis ja ne imageblan embarason al ni, sed grandan senilu-ziiĝon al la ŝtelisto, kiu trovis ne monon, sed, por li, senutilan paperaĉon! Nur je la fino de la Kongreso estis al ni kaŝe redonita malgranda parto de tiuj tre valoraj, por ni, dokumentoj! Spite de la gravaj malfacilaĵoj, kiuj ĉi tiu situacio abrupte estigis, la kongreso sukcesis marŝi laŭ la pretigitaj planoj, aŭ, pli bone, laŭ la neantaŭvidita helpo de la Providenco.

Fakte, iom peza montriĝis kelkfoje la anonco de multaj gravaj kunsentoj, bondeziroj, telegramoj, leteroj, paroladoj, poeziaĵoj, salutoj, ktp. kiuj per unu trajto estis forspongitaj de la inaŭguro de nia Kongreso. Inter la perditaj programeroj estis ankaŭ parolado skribe pretigita de s-ano Walter Mudrak, unu el la oficialaj oratoroj. Sed, ĉar li ne povis persone partopreni pro sia ne tro bona farto, oni preskaŭ ne perceptis tion. Kaj ĉar ni esperas ricevi denove de la oratoro la tekston, kiu povos aperi en nia revuo, tiu parolado estos tiamaniere sekvata de multe pli granda nombro da personoj.

La inaŭguro estis solena. Post la unua frumatena kunsido de la Estraro, ĉiuj kunvenis en la vasta salono de Villa Emaus, laŭga por tricent sidantaj personoj. Ĝi, zorge pretigita per bela, okulfrapa strio anoncanta nian Kongreson kaj per granda flago ornamanta la tablon de la prezidanteco, pleniĝis rapide per la amaso de la kongresanoj kaj per reprezentantoj de la Itala kaj Vatikana gazetaro kaj televido.

Tiuokaze kun granda ĝojo de ĉiu, oni revidis nian Prezidanton Ferdinando Longoni, kiu kuraĝe, post grava kaj longa malsano, reaperis inter ni por gvidi la Kongreson. Li, kiu iam energie savis IKUE-n, redonante al ĝi la ĝustan direkton dum unu el la plej malfacilaj ĝiaj vivmomentoj, post preĝo al la Sinjoro laŭ la teksto donita en la 2a paĝo de la Kongreslibro, indikis la precizajn celojn de ĉi tiu kongreso, kiu devos estigi novan decidan impulson al nia movado. La festparolado estis komisiita al Pastro Paruzel, kiu verve, laŭ sia elbordiĝanta agema karaktero, salutis la kunvenintojn, prilumis la temon de la kongreso, kiu, laŭ la religia aspekto, identiĝas kun tiu de la Jubilea Jaro, kaj je komparo de la Eklezia historio, montris, ke danĝeroj de disfalo kaj de herezoj ĉiam instigis al reago, progresigante

kaj renovigante la Eklezion. El la aspekto de la malsamaj vokiĝoj de la apostoloj, kies bazilikojn ni vizitos, li deduktis la konvenon, ke la Centro de nia Katolika Esperanta Asocio estu en Romo, ĉe la katedro de Petro, kiel garantiaĵo de fideleco al la eklezia doktrino. La apostoleco de Paŭlo, reliefigita de lia baziliko, instigos nin strebi por la disvastigo de nia sankta idealo, dum la Baziliko de S. Johano nin alvokos al la samsento kun la Eklezio. Fine la Baziliko de S. Maria la Plejgranda memorigos nin, ke devocio al nia ĉiela Patrino ĉiam estis ĉefa trajto de nia Asocio, kaj oni esperas konfirmi ĝin per celebrado de la venonta kongreso en la Maria-urbo Ĉenstoĥova, kiu kun Niepokalanov ne nur parolas al la poloj, sed al la mondo, pri vigle aganta kredo.

Viciĝis poste por transdoni salutojn la ĉeestantaj reprezentantoj de 18 landaj IKUE-asocioj: Argentino, Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavio, Litovio, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Rumanio, Urugvajo, Usono. Bedaŭrinde ne ĉiam, personaj vortoj povis anstataŭi leterojn, salutojn, telegramojn, k.s., kiuj, oficiale aŭ pro amika kunsento alvenis al la Kongreso, sed perdiĝis ekde la komenco. Ni mencias nur pri Walter Mudrak, el Aŭstrujo; Vigar Norman el Britujo; pri telegramoj el Francujo kaj Hispanujo; pri mesaĝoj de Jacques Tuinder kaj De Boer el Nederlando, K. Perko el Aŭstrujo, Berka el Ĉeĥoslovakio, Kiŝ el Jugoslavio, Veszpremi el Hungarujo; kaj poste el multaj aliaj aliĝintoj, kiuj kun granda bedaŭro pro malsano aŭ aliaj malhelpoj, kiel Leszek Irek, direktoro de "Evangelia Ritmo", ne povis veni; inter ili precipe la esperantista episkopo Mons. Pichler el Jugoslavio kaj mons. Violi el Italujo. Ni jam ne povas ĉiujn memorigi, ĉar inter la perditaj dokumentoj estis ankaŭ la registro de la pli ol 2600 ĉijaraj leteroj! Apartan salut-mesaĝon transdonis

Paruzel mem nome de la entrepreno "Biblia Revuo", la grava internacia periodaĵo, kies redaktoro li estas, kaj kies direktoro estas Prof. Sac. Angelo Duranti, iniciatinto de la Centra Oficejo de IKUE, per la transdono al ĉi tiu de la tiel nomata "Opera Farsetti", sendependa malgranda apartamento situanta apud placo S. Johano en Laterano. Laste, kaj longe aplaŭdita, parolis fr-ino Sieglinde Stamm, oficiala reprezentanto de KELI; kaj tiel montriĝis, kiel profunda estas jam la sento de frateco inter ni kaj ĉiuj aliaj kristanoj, kvankam nine konsentas pri kelkaj gravaj doktrinaj punktoj. Tiumomente la horizonto de nia kristana familio larĝe plivastiĝis, levante ĉiujn pli alten.

La solena inaŭguro kulminis kiam grupo da polaj kantistinoj paradis sur la podio. La spektaklo de la rava porokaza kostumo de la ensemblo kaj la elektitaj kantoj, akompanataj de la pianisto Ryszard Lecki, ekscitis la plej entuziasman aplaŭdon de la aŭskultantaro.

Tiel, kvankam, kiel dirite, sac. Leszek Irek ne ricevis permeson de la politikaj instancoj por veni, kaj kun li rezignis ankaŭ la juneca ensemblo "Evangelia Ritmo", pola grupo aranĝis tiel zorge ankaŭ la artan programon, ke sub la reĝisorado de W. Tomaszeck, oni preparis por nia kongreso belegajn pecojn. Ni nur memoras pri kelkaj: "Mi amas vin" (E. Grieg); "Ho mia kor'" (Zamenhof), kantita de Kossakowski. "Ne forgesu min" kaj "Mi amas vin senlime" (De Curtis); "Deziro (G.A. Bixio); "Mia suno" (E. Di Capua), kaj "Granada" (A. Lara). Kaj ankoraŭ: "Ho granda Dio" (S. Moniusko); "Marŝante sur la ondoj" (sonato de F. Liszt); Mazurkoj kaj Valsoj (F. Chopin), kaj "Preĝo sub la verda standardo" (Zamenhof), aranĝita de la baritono R. Kossakowski. Precipe merite de ĉi tiu kaj de la pianisto R. Lecki, nelacigeblaj, la arta programo plenumis mirinde sian rolon.

Revenante al la kongresejo ĉiuj amasiĝis ĉe la benko, kie jam funkciis la poŝta servo, por sendi bildkartojn kaj leterojn kun la speciala poŝta stampo de la unua kongresa tago. Ankaŭ la bela serio de bildkartoj, ilustrita de la roma s-ano Salvatore G. Messina, kaj presitaj okaze de nia kongreso, estis tre petata.

Post la tagmanĝo en la vastega manĝosalono, entenanta preskaŭ mil personojn, jam atendis nin kvar grandaj pulmanoj, por ebligi al ni la vesperan programon. Dumvoje al S. Maria La Plej Granda ni malsupreniris por viziti en Via dell'Olmata la tombon de la pola Servantino de Dio Maria Tereza Ledokowska, kiu baldaŭ (oktobre) estos glorigata per la Eklezia titolo "Beata". Poste sur la ŝtuparo de la Maria-baziliko ni havis la memorigan kongresan foton (v.p.204-205).

Je la 17a horo okazis la solena diservo. Vere religia spektaklo: preskaŭ 40 sacerdotoj el 14 landoj, iranta antaŭ Mons. Wladislaw Miziolek, la esperantista Episkopo helpanta de Varsovio, defilis de la sakristio ĝis la konfesaltaro. La granda baziliko estis plena je esperantistoj, je multaj interesitoj por la escepta okazo, krom je tutmondaj pilgrimantoj pro la Jubilea Jaro. Post la malfermaj vortoj de la episkopo, la meso komenciĝis: ĉiuj havis sian libreton, kaj tiel ĉiuj partopreninis plenvoĉe en la rito. Longa estis ankaŭ la vico de la komuniantoj.

La sekva tago estis tiu de S. Petro. Ankaŭ ĉi tie solena kuncelebrado ĉe la konfesaltaro, ĝuste sub la Bernini-a baldakeno, kiu stariĝas precize super la tombo de la unua apostolo. La katolika esperantistaro sentis profunde tiuokaze de kiu radiko venas la forto de la katolika vivo kaj de la tuta Eklezio, aŭ pli bone, sur kiu ŝtono ĝi estis starigita de Kristo, por etendi siajn brakojn al la tuta mondo.

En la programo estis vizito al la baziliko kaj Vatika

naj memoraĵoj; sed estis praktike neeble detale viziti ilin. Ankaŭ ĉi-tage, kvankam la tagmanĝo estis antaŭvidita elektebla ĉe diversaj restoracioj, ĉiuj preferis troviĝi denove kune en la kongresejo, por partopreni tuj post la manĝo en la roma trarigardo pere de niaj aŭtobusoj.

Sed je la 17,30 ni estis denove apud S. Petro por la Papa ĝenerala aŭdienco. Pluvegis, kiam ni alvenis tien. Sed iom post iom la ĉielo sereniĝis, kaj kiam ni sukcesis eniri per speciala bileto en nian rezervitan lokon, la benkoj estis ankoraŭ iom malsekaj. Sed la sopirata horo alvenis. Tiam la placo estis plenplena de ĉiu rasaj homoj: bildo de la katolika mondo.

Por formeti ĉian triumfaspektan manifestacion, ankaŭ la seĝo-katedro de la Papo ne plu estis orumita, sed blanka kaj modesta. Sed tie estis la Papo, salutata per ŝtormaj aplaŭdoj, kiuj akompanis lian malrapidan iradon. La Papo, la posteulo de Petro, la reprezentanto de Kristo, la signo de unueco inter Kristo kaj la Eklezio! Kiom oni sentis tion dum la ne haltigebla aklamo! Ĉu la Papo sciis pri ni, kiuj estas inter liaj plej fidelaj filoj? Ĉu li havos benon ankaŭ al ni? Ĉu li parolos al ni? ... Kaj se ĉi tio realiĝos, ĉu nia esperantista amaso, kiu tiom arde atendis tiun momenton, scikapablos sinregi, ĝis lia lasta vorto? Ni memoras, ke dum la 29a IKUE-kongreso de 1962, kiam Papo Johano 23a en Castel Gandolfo malfermis sian buŝon por paroli al la Esperantistoj, ĉi tiuj ne plu sin regis, kaj la tondra aplaŭdo, kiu eksplodis, kovris la lastajn vortojn de la Papo, kvankam li per gesto petis aŭskultadon. Ili esperis, ke la Papo atendos la finon de tiu ĝoja esprimo. Sed tiel ne estis. Kiam finiĝis la aklamo, la Papo jam finis ankaŭ siajn salutvortojn.

Ni avertis niajn samideanojn, sed ni ankaŭ timis, ke oni forgesos pro la ĝojo ĉiun admonon. Ni sentis, ke tiu

okazo estas kvazaŭ centro de nia kongreso. Nia atento estis streĉa, kiam la Papo komencis sian paroladon, nomante ĉiujn grupojn alvenintajn al li. Fine nia koro ekkaltis: la Papo anoncis ankaŭ al ni sian apartan saluton!

Sed antaŭe la universala Majstro devos paroli al la ĉeestanta amaso, paroli al la katolika mondo, al ĉiuj homoj de bona volo. La temo de lia parolado estis: "Devosento en la kristana vivo". Ĉi tio donis al li okazon por forte akcenti, ke la jubilea renoviĝo kunportas reaprecadon pri la morala devo, pri bono kaj malbono, opozicie al la laŭmoda permesismo kaj al la individua kaj socia egoismo.

La fino de lia universala parolado ebligis la komencon de liaj apartaj vortoj al ĉiu grupo. Kaj ni estis la unua:

"Nun - li diris en la itala lingvo - ni adresas nian saluton kaj nian bondeziron al la partoprenantoj en la 36a Internacia Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj. Al viaj apartaj kulturaj celoj vi volis aldoni noton delikatege religian, eniĝante en la spiriton de la Jubileo, kiu al ĉiuj bonvolaj homoj parolas pri renoviĝo, pri konvertiĝo, pri retrovita kontakto kun Dio, kiu amas kaj pardonas. Ĉi tiu spirito gvidu vin en la instigo al frateco kaj interkompreniĝo inter la diversaj popoloj malsamlingvaj, laŭ la programo, kiu vin distingas. Tio estas nia sincera bondeziro, kiun ni plivalorigas per nia Apostola Beno, favoranta la donacojn de la Sinjoro".

La esperantista popolo, kiu preskaŭ ne plu rezistis pro la ĝojo, longe kaj varmege dankis la Papon pro tiuj vortoj. Neniam, fakte, la Papoj, ĉu ili havis antaŭ si nur malmultajn esperantistojn, ĉu grandan fidelularon, parolis tiel solene kaj publike antaŭ la mondo al ni. Vere historia tago estis por ni tiu, pri kiu la gazetaro raportis ankaŭ kun fotoj, kaj "L'Osservatore Romano", ĉiam sindetena pro singardo, kvarfoje dum la

postaj tagoj parolis pri internacia lingvo kaj pri nia movado.

La leviĝo, matene de la 14a, estis verŝajne tro frua por kelkaj; ĉar jam je la 6,30 h. oni matenmanĝis por foriri je la sepa al la planita ekskurso al Montecassino. Tamen ĉiuj ĉeestis, precipe la poloj, kiuj konsistigis iom malpli ol la duono de la tuta kongresanaro (120 el 264).

Tuj alveninte, oni zorgis por la meso en la nova preĝejo, entute rekonstruita post la bombadoj de la lasta milito, kiuj ĉion ekstermis sur la monteto. Ĉe la tombo de S. Benedikto kaj la retrovitaj relikvoj de lia fratino, Sankta Skolastika, nun denove kunigitaj, en la meso solene leviĝis la kantoj akompanataj kun tre delikataj kaj religisentaj melodioj.

La vizito al la monumenta tombejo de la pola militistaro estis ankoraŭfoje tre kortuŝa momento. Mons. Miziolek deponis ĉe la subĉiela altaro florbukedon, memorigante ke, dum Esperanto, en kies lingvo oni preĝis, estas alvoko al la dia mizerikordo por la mortintoj, samtempe ĝi estas admono al la homaro, por ke neniam plu okazu tiaj hombuĉadoj inter civilaj popoloj, kiuj, male, devas celi sian proĝreson per la kristana amo kaj frata interkompreno.

En la granda restoracio "Da Mario" sekvis tagmanĝo. Sed ĉi tie okazis kurioza incidento, kiu, feliĉe, pro la lerteco de la personalo, preskaŭ ne estis perceptita de la amaso de la esperantistoj. Fakte tute alia estis la restoracio kontraktita; sed pro la perdo de la dokumentoj, dum tiu estis forgesita, kaj pro tio ĝi ne ricevis konfirmon, "Da Mario", male, ricevis, ja, telefonan anoncon, tamen ne kalkulitan valida pro manko de konfirmo. Tiel ke, kiam la ducent esperantistoj invadis la restoracion, jam preskaŭ plena de aliaj grupoj, es-

tiĝis konsterna situacio por la personalo. Oni vigle diskutis kaj ekscitiĝis, sed fine oni konsentis pretigi ĉion por la ne antaŭvidita amaso de la alvenintoj, kiuj povis trankvile ricevi la manĝon, eĉ dum rekorda tempo. Fakte la programo estis planinta, post la manĝo, alian viziton, ĉifoje al la monumenta abatejo de Casamari, situanta en Veroli, prov. de Frosinone, unu el la unuaj benediktanaj abatejoj en Italujo (1005 j.). La gotika preĝejo, konstruigita de Kard. Savelli en 1203, estis de li mem, kiel papo, konsekrita. Hodiaŭ ĝi estas konata precipe pro la gregoria kanto, kiu tie havas sian oficialan eldonejon en la Eklezio. Post vespermanĝo en la kongresejo, ne nur P. Ciccanti, kiu devus reĝisori la vesperfeston, sed la plej multo de la aliaj, lacaj pro la plena tago, preferis ripozi.

La kvara tago de la kongreso estis dediĉita precipe al la akiro de la sankta Jubileo. Je la 8,30 h. oni atingis per niaj pulmanoj la bazilikon de Sankta Paŭlo. La relikvoj de la plej granda apostolo de Kristo komunikis certe al la bone disponita animo de ĉiuj almenaŭ fajreron de lia flamanta koro, kaj la sinsekvaj portretoj de ĉiuj papoj, ekde Petro ĝis Paŭlo 6a, sentigis al ni preskaŭ palpeble, ke Kristo, pere de siaj anstataŭantoj, ĉiam gvidis la ŝipeton de Petro, kaj ĉiam gvidos ĝin, laŭ sia promeso. Jarcentoj pasos, la Eklezio mem ŝanĝos siajn vestojn, sed ĝi restos tiu Eklezio, al kiu li komisiis, kun la riĉeco de sia doktrino, sian ĉiaman asiston.

La aŭtobusoj kolektis denove ĉiujn por Sankta Johano en Laterano. Estis la soleno de la Ĉielenprenita, kaj krom la pilgrimantaj grupoj aparte multenombraj, plenigis la bazilikon ankaŭ la roma fidelularo. Akurate, je la 10a h. nia sacerdota defilado, kiu ŝajnis senfina, procesiis al la konfesaltaro, dum la "schola cantorum" kun akompano de la orgeno enkondukis inviton al la sankta

rito. Pro la ĉeestanta popolo, la meso estis en la latina (en la komunaj kanteblaj partoj) kaj en la esperanta en la legaĵoj kaj en ĉiuj aliaj preĝoj. Ankaŭ la homilio estis en la esperanta, sed ĝi rezervis parton al la itala fidelularo. Ankaŭ ĉi tiu meso, kiel tiuj de la aliaj tagoj, direktita de la bazilika ceremoniestro, estis triumfa parto de nia kongreso.

Kutima celo de multaj pilgrimantoj, kaj do, ankaŭ nia celo, estis, post la meso, vizito al la Sankta Ŝtupa-ro, kiu, portita de la pretora palaco de Jerusalemo al Romo, laŭ la antikva tradicio, estis loĝigita en aparta preĝejo de la sama placo S. Johano. Multaj fideluloj ĝin supreniras surgenue.

Komuna manĝado en la restoracio de Domus Pacis, kaj baldaŭ denove al Sankta Petro, ĉifoje por la solenega celebrado de la Papo honore al la Ĉielenprenita Je la deksepa horo la Papo alvenis al la Vatikano per helikoptero, de Castelgandolfo, kie li kaj lia kurio malstreĉas iomete la laboron (kia laboro dum ĉi tiu Sankta Jaro!) kaj je la dekoka precize li aperis en la baziliko, kie amaso el centmil fideluloj lin atendis. La esperantistaro jam ricevis elektitan lokon dekstre de la konfesaltaro, de kie ĝi povis ĝui la solenegan diservon, nomatan "Papa Kapelo". Longa, sed inda krono de nia jubilea kongreso.

Ankoraŭ arta, vere varioplena vespero post vespermanĝo, kaj la postan tagon lasta kuncelebrado en Villa Emaus kaj fermo de la kongreso.

La 36a IKUE-kongreso finiĝis! Kvankam ni ne povas diri, ke ni ne donis al ĝi ĉiujn niajn zorgojn, tamen ni devas agnoski, ke nenion oni estus farinta sen la valora helpo de multaj. La Prezidanto per superhomaj fortostreĉoj, pro lia konata malbona farto, provizis bildkartojn, insignojn, kompilis la Kristanan Jarlibron kaj la Preĝaron. Mons. W. Miziolek per siaj vortoj, per



sia modesta sed tre eminenta persono, donis al niaj entreprenoj tian oficialecon, ke sufiĉis lia ĉeesto por aldoni brilegon al la sanktaj ritoj kaj lia nomo por malfermi ĉiujn pordojn, alie baratajn.

Pastro Paruzel per sia senmezura aktiveco organizis, direktis, subtenis ĉion, tiel ke li estis ĉiam la animo de nia kongreso. Kun li ankaŭ p. P. Tic, rezidanta en Romo, kaj aparte la pola kantista grupo, kiu riĉigis religiajn ritojn kaj artajn vesperojn per siaj belegaj muzikaj programoj.

Inter la roma s-anaro estus malfacile indiki hierarkion da servoj; sed inter ili elstaras la nomoj de s-ino Carolina Minnaja, de D.ro A. De Salvo, de A. Scalia kaj de la Sekretariino de la Kongreso ĉiam ĉeestanta, ĉiam afable servopreta, Izavel Remenyi Puracchio.

Kvankam ni ĝojas, ke per la malavara helpo de multaj, ni povis doni grandajn ĝuojn al nia kongresanaro, ni ne volas kaŝi, ke ne ĉio iris glate laŭ la pretigita programo. Pri kelkaj aranĝoj ni jam parolis. Sed aliaj mankoj okazis, ekz. pro la nesufiĉo de fakaj kunvenoj. Eĉ, ne havis lokon la ĝenerala asembleo, kiun povis nur parte kompensi la solena inaŭguro. Ni antaŭvidis tion, kiam ni volis mallongigi la kongreson kutime septagan aŭ almenaŭ sestagan al nur kvin tagoj; unue por faciligi la restadon de la multaj poloj, kiel ili ekde la komenco estis kalkulitaj. Due, ankaŭ por doni al la kongresanaro la minimumon da distraĵoj, por ke ĝi efiku pli bone spirite. Sed pri tio kaj pri kelkaj aliaj dezireblaj aranĝoj iom influis la antaŭtempa foriro de la Prezidanto, kiu videble ne povis elteni la streĉajn kongresajn laborojn, kaj la nekalkuleblaj perdoj de tempo en Romo, nomata "eterna"!

Kvankam ni mezuris kun larĝa marĝeno la nombron de la kongresontoj - verŝajne iom pli ol cent, maksimume ducent - ni ne povis imagi, ke la petoj estos tricent

sesdek! Pro tio iumomente ne estis plu disponeblaj kongresdokumentoj. Kaj aliflanke ni ne kuraĝis haltigi la aliĝojn, timante, ke granda kvanto da petintoj tre verŝajne ne sukcesos veni pro sialandaj malhelpoj. Fakte la plejmulto ricevis tiel malfrue la esperitan permeson, ke kiam ili avertis nin pri tio, ilia letero alvenis post la kongreso!

Se ni alkalkulas ankaŭ la antaŭtempan alvenon de multaj pro manko da ĉiutagaj vojaĝservoj; la devigan restadon de aliaj pro strikoj de fervojoj; ke ne mankis iuj, kiuj venis entute senmone, plene fidante al ni..., o ni povas iom imagi, kiom da malfacilaĵoj ni renkontis, senkompare pli grandaj, ol tiuj de la 29a IKUE-kongreso, kiun ni mem organizis antaŭ dek tri jaroj.

Ni esperas, do, ke konsidere de ĉio, kion ni diris, kaj de la multo, kion ni ne povis priskribi, la mankoj malgrandiĝos, kompare al la sukceso.

Fakte, la ĝenerala aprecado, tiel taksis nian kongreson. Ni ricevis tiom da sinceraj dankatestoj, da kortuŝaj esprimoj de ĝojo, pro tio, kion oni ricevis, ke ni mem devas agnoski ĉiun meriton ne al ni, sed al la dia Providenco. Dio gvidis vere nian kongreson! Li meritas ĉiujn dankojn! Li donis al ni per ĉi tiuj senteblaj ĝojoj, la signon de la interna graco, kiu plenigis nian animon. Jes, pri ĉio, ni danku Dion!

Sed, laŭ ĉi tiu perspektivo, permesu al ni raporti kelkajn el la multaj dankvortoj, kiujn en la kongresa Albumo, valora donaco de pastro Tadeusz Nowakowski, aŭ en leteroj de amikoj, oni volis esprimi al ni:

"Korajn dankojn pro la belegaj impresoj el la Katolika Kongreso, kaj ĉion plej bonan por la estonteco esprimas la poloj el Krakovo" (kun multaj subskriboj).

"Ni Vroclavaj geesperantistoj dankas al karega P. Giacinto Jacobitti pro familia atmosfero kaj belaj travivaĵoj dum ĉi tiu belega kongreso. Ĝis la revido en Ĉen

stoĥova!" (Kun deko da subskriboj).

"Belega,neforgesebla kongreso" estas la plej oftaj prijuĝoj, kiujn oni aŭdis same de veteranaj esperantistoj, kiuj neniun nacian aŭ universalan kongreson preterlasas, kiel ankaŭ de novaj samideanoj, kiuj je la unua fojo partoprenas en esperanta kongreso. Pri "grandioza sukceso", "brila kongreso", pri "ĉarmaj tagoj" sin esprimas diverslingvanoj en la lingvo, kiu igas la mondon "unu granda, ronda familio". Kelkaj memorigas la akuratajn servojn de la pulmanoj, la ekskursojn en kaj ekster Romo; aliaj la solenegajn kuncelebradojn. Ĉiuj, la ĝojon pro la papaj aŭdienco kaj parolado.

La Sekretario de IKUE skribis al ni: "Mi ne scius, kiel mi povus sufiĉe danki vin pro la grandega laboro, kiun vi plenumis, kaj kiu donis tiajn belegajn rezultojn. Ĉi tiu kongreso de Romo estas nepre la plej impona, prestiĝa kaj bela en la historio de nia Asocio, kaj nia IKUE, kvankam ĝi estas inter la plej malgrandaj tutmondaj asocioj, nun povas fieri, merite de via laboro, ĉar ĝi havis kongreson kiu, ankaŭ en la esperantista kampo,restos grandioza. Via laboro donos sendube grandajn fruktojn, kaj via nomo estos ĉizita, kiel granda danko, ne nur en la koro de ĉiu partopreninto, sed ankaŭ de ĉiuj membroj".

Por kompletigi la liston de la aliĝintoj al la Kongreso, jen la lasta nomvico:

335 Lecroisey Jacques
336 Minio-Paluello T.
337 Puracchio Pasquale
338 Remenyi Puracchio I.
339 Allewaert Jan-Pierre
340 Bertolazzi Maria
341 Longoni Sr. Maria
342 Michelitsch Martin
343 Kowalczyk Gertruda
344 Marchewicz Irena
345 Kowalewska Anna
346 Marcetta GianCarlo

347 Musella Anna
348 Gambuti Antonio
349 Roca Agustina
350 Stamm Sieglinde
351 Knoflack Francisko
352 Colas Margherite
353 Zudlasik Jan
354 Belkers Jozef
355 Kowalska Wanda
356 Urbajtis Pietro
357 Zawada Maria
358 Majewski Witold

Entute 358, el kiuj:

187 el Pollando; 91 el Italujo; 21 el Francujo; 10 el Nederlando kaj Hispanujo; 7 el Germanujo, Jugoslavio k. Hungarujo; 4 el Aŭstrujo; 3 el Belgujo kaj Usono; 2 el Britujo, kaj 1 el Ĉeĥoslovakio, Norvegujo, Urugvajo, Argentino, Romanio, Sovetunio.
Ne povis veni 67 aliĝintoj el Pollando kaj entute 26 el aliaj landoj. Sed al ĉiuj el ili ni sendis, laŭ ebleco, memoraĵojn de la Kongreso.

ELIZABETA A. BAYLEY SETON

Nova astro en la ĉielo de la katolika Eklezio

La solena kanonizado de Elizabeta Anna Seton (14-IX-1975), la unua persono deveninta de la Nordamerika kontinento, ekscitis grandan ĝojon en la katolika Ameriko. La nova sanktulino naskiĝis en Novjorko je la 28a de aŭgusto 1774, de episkopanaj gepatroj. Iom pli ol 19jara, ŝi edziniĝis kun Vilhelmo Megee Seton, episkopano, internaciskala komercisto, kaj de li, dum naŭ geedzaj jaroj, ŝi havis 5 filojn. Sed post la morto de la edzo en Pisa (Italujo), kien ŝi akompanis lin, ŝi restis ĉe katolikaj amikoj, kiuj helpis ŝin grandanime. Interparoladoj kun unu el ĉi tiuj, Antonio Filicchi, senti

gis al ŝi la dian impulson sekvi la katolikan kredon, kaj la 14an de marto 1805 ŝi kun siaj 5 filoj eniris en la katolikan Eklezion. Neglektita de ĉiuj familianoj, kiuj ne pardonis al ŝi la forlason de la episkopisma konfesio, ŝia familio estis subtenata de Antonio Filicchi kaj de aliaj grandanimaj konatoj. Dum ŝi zorgis pri siaj filoj, samtempe naskiĝis kaj pli kaj pli klariĝis en ŝia koro vokiĝo al instruado de multaj aliaj. Malgranda lernejo estis de ŝi malfermita ĉe Baltimoro por edukiĝo de katolikaj knabinoj, kaj post unu jaro apud Emmitsburg estis kreita, helpe de bonfarantoj, lernejo-kolegio, por libera kaj senpaga instruado al malriĉuloj kaj por religia kongregacio, kiu donos al tiu entrepreno eblecon de daŭra direkcio.

Tiel naskiĝis la Kongregacio "Fratinoj de la Karitato de S. Jozefo" en Ameriko, laŭ la reguloj de la Filinoj de la Karitato fonditaj de S. Vincento de Paŭlo, oportune adaptitaj al la karaktero de la nordamerika popolo. Oni povas apenaŭ imagi, kiom da ĉiuspecaj malfacilaĵoj antaŭ tiu tute nova situacio renkontiĝis ĉiupaŝe. Sed la organiza kapableco de Elizabeta ĉion sukcesis superi. Tamen ŝia propre dirita religia vivo komenciĝis je 19 julio 1813, post la novicjaro, kiun ŝi plenumis kun sep aliaj kunulinoj; ĉar de tiu momento ŝi estis elektita generala superulino dum tri sinsekvaj periodoj. En 1817 ankaŭ la civilaj aŭtoritatoj de Maryland donis la juran agnoskon al la institucio, kie, je la morto de la fondintino - 4 januaro 1821 - jam havis 40 fratinojn kaj du aliajn filiajn domojn en Filadelfio kaj Novjorko.

La fratinoj de Elizabeta disvastiĝis inter pluraj diocezoj kaj hodiaŭ ili konsistigas 6 malsamajn kongregaciojn kun centoj da aktivaj institutoj por instruaj, karitataj kaj hospitalaj celoj. Dum sia vivo Elizabeta akiris grandegan admiron kaj respekton, kaj post la morto ankaŭ sanktecan famon; sed oni devis atendi 86 ja-

rojn por enkonduki la sanktigajn procezojn, kiuj je 18 de decembro 1963 atingis ŝian beatigon kaj hodiaŭ kanonizadon.

Usono ĉeestis en ĉi tiu sia historia evento per partopreno de multaj civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj kaj de 15.000 personoj. Inter ili 6 kardinaloj, 80 episkopoj, 700 sacerdotoj kaj 1300 fratinoj. Ĉeestis ankaŭ pli ol 30 geparencoj de la sanktulino. En Maryland-ŝtato la 14a de septembro estos nomata "Tago de S. Elizabeta".

Dum la kanoniza rito la Papo faris la jenan homilion:
(tr.C.M.-P.M.)

"Jes, respektegindaj Fratoj kaj karegaj Gefiloj! Elizabeta Anna Seton estas Sankta!

Ni ĝojegas kaj estas kortuŝitaj pro tio, ke nia apostola ofico rajtigas nin fari ĉi tiun solenan deklaron antaŭ vi ĉeestantaj, antaŭ la sankta katolika Eklezio, antaŭ niaj kristanaj Fratoj en la mondo, antaŭ la tuta Amerika popolo, antaŭ la tuta homaro. Elizabeta Anna Bayley vidvino Seton estas Sankta!

Ŝi estas la unua filino de Usono, glorigita per ĉi tiu senkompara titolo.

Sed kion signifas diri: "Ŝi estas Sankta"?

Ni ĉiuj facile havas intuicion pri la signifo de tiu supera kvalifiko; sed estas por ni malfacile fari ekzaktan analizon: Sankta signifas perfektan, je perfekteco atinganta la plej altan nivelon, kiun homa estaĵo povas atingi. Sankta estas homa kreitaĵo plene konforma al la volo de Dio. Sankta estas animo, en kiu ĉiu peko - principo de morto - estas forigita kaj anstataŭita de vivanta brilo de dia graco. La analizo de la koncepto pri sankteco kondukas nin rekoni en iu animo la renkontiĝon de du elementoj tute malsamaj, sed kunfluantaj en unikan rezulton, kiu estas ĝuste la sankteco; unu el tiuj elementoj estas homa kaj morala, leviĝinta al la grado de

heroeco: la heroeco de la virtoj estas ja ĉiam postulata de la Eklezio por la rekono de la sankteco de iu persono; la alia estas la elemento mistika, kiu esprimas la mezuron kaj la formon de la dia agado en la persono mem, elektita de Dio por realigi en si mem, en ĉiam originala esprimo, la imagon de Kristo (vd. Rom.8,29).

La scienco pri la sankteco estas, do, la plej interesa, la plej varia, la plej surpriza, la plej rava el ĉiuj esploroj pri tiu estaĵo ĉiam mistera, kiu estas la homo.

La Eklezio plenumis tiun esploradon en la biografio, nome en la interna kaj ekstera historio, de Elizabeta Anna Seton, kaj ĝi jubilis pro admiro kaj ĝojo, kaj hodiaŭ sentis sian gracon de vero verŝiĝi en la krion, kiun ni levas al Dio kaj anoncas al la mondo: ŝi estas Sankta!

Ni ne faros nun la panegiron, nome la glorigan rakonton pri la nova Sanktulino; vi jam konas ŝian vivon, kaj sendube vi ĝin studos plue. Jena estas unu el la plej valoraj fruktoj de la kanonizado de la nova Sanktulino: ŝin ekkoni, por admiri en ŝi homan figuron superan; por laŭdi Dion, kiu iĝas admirinda en siaj Sanktuloj; por imiti ŝiajn ekzemplojn, kiujn ĉi tiu ceremonio metas en lumon de ĉiama edifo; por petegi ŝian protekton nun, kiam ni estas certaj pri ŝia partopreno en tiu cirkulado de ĉiela vivo de la mistika Korpo de Kristo, kiun ni nomas la interkunuleco de la Sanktuloj, kaj al kiu ni, kvankam ankoraŭ en la surtera vivo, apartenas.

Tial ni ne parolos pri la vivo de nia Sankta Seton. Ĉi tiu estas nek la momento nek la loko por digna memorigo.

Sed permesu, ke mi almenaŭ faru la liston de la ĉapitroj, kiuj devus konsistigi ĉi tiun memorigon.

Elizabeta Seton estas amerikanino. Ni ĉiuj tion diras kun spirita ĝojo, kaj kun la intenco honori la landon kaj la Nacion, kie ŝi mirinde ĝermis kiel unua flo-

ro en la albumo de la Sanktuloj. Ĉi tiun titolon la priplorata Kardinalo Spellman, Ĉefepiskopo de Novjorko, rekonas al ŝi kiel karakterizan kaj ĉefan, en la antaŭparolo, kiun li verkis por la bela volumo de Dirvin: "Elizabeta Anna Seton estis vera Amerikanino!"

Ĝojegu, ni diros al la granda Nacio Usono: ĝojegu pro ĉi tiu via glora Filino; estu fiera pri ŝi, kaj kapablu gardi ŝian fekundan heredaĵon. Ŝi, belega figuro de sankta virino, prezentas al la mondo, al la historio, la apologion de iu nova kaj aŭtentika riĉaĵo via, la religia spiriteco, kiun via surtera prospero ŝajnis malheligi kaj preskaŭ malebligi. Ankaŭ via tero, ho Ameriko, estas inda akcepti en sian fekundan grundon la semon de la evangelia sankteco. Jen, kun multaj aliaj, ĉi tiu belega atesto. Vi povu ĉiam kulturi ĝian puran fekundecon, kaj sperti, ke ĝi - tute ne haltigante la evoluon de via fortika viveco ekonomia, kultura kaj civila - estos, siamaniere, ĝia ĉiama gardanto.

Elizabeta Seton naskiĝis, kreskis kaj estis edukata religie en Novjorko en la Episkopana Konfesio. Ĉi tiu Eklezio havas la meriton, ke ĝi vekis kaj nutris la religian senton kaj la kristanan sentimenton, kiuj en la juna Seton estis nature inklinaj al la plej spontaneaj kaj vivaj korelverŝoj: ni volonte agnoskas tiun meriton, kaj, bone sciante, kiom kostis al Elizabeta la transpaso al la katolika Eklezio, ni admiras ŝian kuraĝon pro la konsekvenco kun la religia Vero, kun la dia Realo, kiuj al ŝi manifestiĝis; same ni vidas kun plezuro, ke el sia aliĝo al la katolika Eklezio ŝi spertis grandan pacon kaj sekurecon, ŝi trovis natura konservi ĉion bonan, kion la aparteno al la fervora Episkopana Komunumo estis al ŝi instruinta, precipe en tiom da belaj esprimoj de la religia pietato, kaj ŝi ĉiam ĉerpis fidelecon de estimo kaj de amemo al la personoj, disde kiuj tiu katolika praktikado ŝin dolore disigis. Estas por ni motivo de

ĝojo kaj aŭguro de pli kaj pli bonaj ekumenaj rilatoj rimarki la ĉeeston en ĉi tiu ceremonio de elstaraj personoj episkopanaj, al kiuj, kvazaŭ interpretante la koron de la nova Sanktulino, ni prezentas nian devotan kaj bondeziran saluton.

Krome ni devas rimarki, ke Elizabeta Seton estis patrino kaj samtempe fondintino de la unua virina religia Kongregacio en Usono. Kvankam ĉi tiu ŝia kondiĉo socia kaj eklezia ne estas unika kaj ne estas nova (ni memoru, ekzemple, pri Sankta Brigita, Sankta Franciska Romana, Sankta Johana Fremiot de Chantal), ĝi aparte distingas la Sanktulinon Elizabeta Anna Bayley Seton pro ŝia plena virineco, tiel ke, en la momento, en kiu iu Virino estas levata al la superaj honoroj fare de la katolika Eklezio, plaĉas al ni reliefigi la feliĉan koincidon inter tiu ĉi evento kaj iu iniciato de la Unuiĝintaj Nacioj: la "Internacia Jaro de la Virino". Tia programo celas favori la konscion pri la devo, superstaranta ĉiujn homojn, rekoni la veran funkcion de la virino en la mondo kaj kontribui al ŝia aŭtentika antaŭeniĝo en la socio. Ni ĝojas ankaŭ pro la ligilo, kiu tiel staris ĝis inter tiu programo kaj la hodiaŭa kanonizado, per kiu la Eklezio plej alte gloregas Elizabetan Annan Seton, laŭdante la personan kaj esceptan kontribuon, kiun ŝi donis kiel virino: nome, edzino, patrino, vidvino kaj religiulino! Nia aŭguro estas, ke la energia agemo kaj la aŭtentikeco de ŝia vivo estu valida ekzemplo hodiaŭ - kaj same por la estontaj generacioj - pri tio, kion la virinoj povas kaj devas efektivigi, en la plenumado de sia rolo, por la bono de la homaro.

Fine ni devas memorigi la plej rimarkindan karakteron de nia Sanktulino: ŝi estis, kiel ni diris, fondintino de la unua Virina Religia Kongregacio en Usono, ĝermo deveninta de la Religia Familio de Sankta Vincento de Paŭlo, kiu poste distingiĝis laŭ diversaj aŭto

nomaj branĉoj, kvin ĉefaj, nun disvastiĝintaj en la mondo, kiuj, tamen, ĉiuj rekonas en la unua grupo, persone starigita de nia Sanktulino, la Monakinoj de la Karitato de Sankta Jozefo en Emmitsburg (Baltimoro), sian unuan radikon. La asistado al la Malriĉuloj kaj la parokaj Lernejoj en Ameriko havis ĉi tiun humilan, malriĉan, kuraĝan kaj gloran originon.

Ĉi tiu memorigo, konsistiganta la centran kernon de la surtera historio kaj de la tutmonda famo de la agado de Patrino Seton, meritus pli vastan informadon. Sed ni scias, ke ŝiaj spiritaj Filinoj zorgos ilustri ŝian agadon, kiel ĝi meritas.

Tial al ĉi tiuj elitaj Filinoj de la Sanktulino ni direktas nian specialan kaj koran saluton, kun la dezires - primo, ke ili povu esti fidelaj al sia prizorgema kaj sankta institucio, ke ili povu kreskigi sian fervoron kaj sian nombron, ĉiam en la konvinko esti elektintaj kaj sekvintaj subliman vokiĝon, kiu estas inda esti servata per la totala dono de ilia koro kaj de ilia vivo. Kaj ili ĉiam memoru la lastan admonon de la sankta Fondintino, diritan ĉe la mortolito, kvazaŭ kiel ĉielan testamenton, je la 2a de januaro 1821a: "Esti infanoj de la Eklezio".

Kaj ni aldonas: "por ĉiam".

Al ĉiuj niaj karegaj filoj kaj filinoj en Usono kaj en la tuta Eklezio de Dio ni transdonas, en la nomo de Kristo, la gloran heredaĵon de Elizabeta Anna Seton. Ĝi estas precipe eklezia heredaĵo de solida kredo kaj de pura amo al Dio kaj al la proksimularo, kredo kaj amo nutrataj per la Eŭkaristio kaj per la Parolo de Dio. Jes, respektindaj Kunfratoj, karegaj Filoj kaj Filinoj: vere la Sinjoro estas mirinda en siaj Sanktuloj! Li estu benata por ĉiam. Amen."